AŬSTRIA

ESPERANTO-REVUO

Oficiala organo de la aŭstria Esperanto-movado
Offizielles Organ der österreichischen Esperanto-Bewegung

Aperas monate

Redakcio kaj administracio: Vieno XV, Fünfhausgasse 16, Austrio. — Telefono R 33-3-64

7 - a jaro NOVEMBRO 1952 n-ro 11

INFORMOJ DE LA ESPERANTO-CENTRO

El la protokolo de la oktobra estrarkunsido: Plenume al letero de UEA pro la enketo de UNESKO pri Esperanto la estraro decidis, ke AEF-prezidanto d-ro Frenzel kaj vic - prezidanto d-ro Führing estos petataj, interveni ce la aŭstria UNESKO-sekcio, por ke ĝi ĉe la UNESKO-centro pledu favore al E. - S-anoj Cech kaj Glüxmann aŭdiencis ĉe urbestro Jonas por akceli la peton de AEF pri subvencio kaj nomigo de la E-Centra domo je "Esperanto-Hof". La urbestro promesis sian subtenon por ambaŭ petoj. Li montris al niaj reprezentantoj la noveldonitan bildalbumon pri Vieno, kiun ricevas ĉiu gasto al li prezentita. Ĝiaj subbildaj tekstoj enhavas ankaŭ Esperanton ! (Vidu.la anoncon sub "TRAMONDO"!) - Por la noveldonotaj oficialaj poŝtkartoj kun E-teksto la AEInstituto jam faris la necesajn tradukojn. - Je la okazo de la 50 jariĝo de la aŭstria federacia kanceliero d-ro Figl la AEF-estraro sendis al la registarestro gratulleteron, pri kiu la kanceliero letere dankis. - S-anino Feichtinger transdonis al la E-Centro el la postlasaĵo de nia mortinta s-anino Ziwutschka sumon de 300 S. - De.la Ministerio por Instruado venis subvencio de S 1000. - D-ro Grimme raportis pri eldono de aŭstria E-antologio. Ĝi aperos en formo de sinsekvaj kajeroj, proksimume 30 paĝaj, similaj al la AERevuo. - Kasistino Loibel raportis, ke la enspezoj el la kotizoj eĉ ne kovras la plej necesajn elspezojn. Saldo de 15.10.52= 556.36 ŝilingoj.

En la lastaj semajnoj okazis la 400a E-sendo de Radio Vieno. Tiuokaze estu esprimata la danko de la Federa-

cio al ĉiuj, kiuj per dispono de manuskripto per lingva kontrolado, per mikrofonparoladoj kaj administrado konstante faris neofte menciatan, sed gravegan poresperantan laboron. Estu permesite al ni, substreki nian danksuldon al la estro de VED, s-ano Emil Vokal, kiu por la ĉiumerkredaj vespersendoj oferadas ĉiusemajne unu duonan nokton.

ĈIUN MERKREDON la estraranoj, klub -kaj fakgrupestroj en la vesperaj horoj havas kunveneblon en la E-Centro por ekster la kadro de la kunsidoj aranĝi necesajn priparolojn. A t e n t u ! Se la stratpordo estas ŝlosita, bv. eniri tra la pordo, alirebla el la korto !

Ekestis denove proponoj pri la noveldono de informa propagandilo por Esperanto. Por ebligi akordan tekstigon kaj aranĝon la kompetentaj ges-anoj el Aústrio estas petataj, verki realigeblajn proponojn, kies ideoj servu por finredakto. Definitivaj ellaboraĵoj estos submetataj al la juĝo de la AEF-landestroj.

La 38a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO laú informo de LKK al nia E-Centro okazos en la tagoj de la 25.7. - 1.8.1953 en la kroata ĉefurbo Zagreb-Agram (Jugoslavio). Aústriaj ges-anoj, intencantaj partopreni la kongreson, estas petataj, sciigi tion al la E-Centro, kiu organizos komunan veturon. AEF proponas, ke la 6a Austria E-Kongreso okazu en la karintia ĉefurbo Klagenfurt de 22.-24.7.53. Samtempe estu okazigata Internacia E-ista Renkonto por tiuj eksterlandaj ges-anoj, kiuj travojaĝos nian landon al la UEK en Zagreb. Ni havos eblon, kontakti kun ili kaj ili povos ekkoni la ĉarman Karintion, la landon de la belaj lagoj kaj de interesaj, malnovtempaj kasteloj !

Sabate, la 29.11.52, 18 h

la E-kluboj KALOCSAY-LABORO kaj AKLE-Vieno

okaze de la

80a naskigtago de s-ano Carl GASPERINI

arangas intiman feston, por kiu

ĉiuj gesamideanoj estas kore invitataj !

Okazejo: Volkshochschule Alsergrund, 9., Galileigasse 8, IIa etago, cambro n-ro 9.

Lunde, la 1an de decembro komenciĝos en Vieno I., Hegelgasse 12 - Bundeslehrerbildungsanstalt - la ĉijaraj aŭtunaj ŝtataj Esperanto-ekzamenoj. Anoncojn direktu tuj al la direktoro de la ŝtata E-ekzamen-komisiono, Vieno I., Minoritenpl. 5. La anoncleteroj estu provizitaj per Bundesstempel je S 6.--, almetaĵoj (escepte literaturliston) je S 1.50. La ekzamenkotizoj (S 30.- por "Scio de E.", S 60.- por "Instrukapablo") estas pagotaj antaŭ la skriba ekzameno en la ekzamenejo. Ekzamen-regularoj estas riceveblaj en la E-Centro.

Ĉu-vi ŝatas, ke bone funkcias la E-Centro? Kompreneble, jes! Kia demando! Vi deziras ja, ke ĝi eĉ "funkciu pli bone". Nu, ĉu vi ne samopinias kun ni, ke bona funkciado de organizo estas altgrade kondiĉita de reciproka agado de elektitaj funkciuloj kaj la membroj? Ĉu utilas, se la centro de organizo, ekzemple, eldonadas direktivojn, kiuj estas parolataj en la venton? Ŝajnas, ke estas ankaŭ necese, ke la membraro fine elagoniiĝu. Jen la eminente grava sukcreso de la fervojistaj E-istoj kaj la E-Centro: La Esperanto-Informtabuloj en stacidomoj kaj poŝtoficejoj. En AER 5/6 estis presita la alvoko, ke "LA GES-ANOJ EN LA DIVERSAJ LOKOJ DE NIA HEJMLANDO, KIE ESTAS FERVOJSTACIOJ AŬ POSTOFICEJOJ, DEKLARU SIN PRETAJ POR FUNKCIADO KIEL HONOROFICAJ REPREZENTANTOJ DE LA AUSTRIA ESPERANTO-SERVO". En n-ro 7/8 ni ripetis la alvokon pro la urĝeco de la afero. Nun s-ano Cech, direktoro de la Aŭstria E-Servo, skribas: "Nian siatempan alvokon bedaŭrinde nur kelkaj ges-anoj priatentis. La AEFestraro ĝin urĝe ripetas, atentigante, ke sole la praktika apliko de E. garantios ĝian evoluon kaj ĝian agnoskon flanke de niaj aŭtoritatoj, kiuj grandparte simpatias nian movadon. AEF ree alvokas siajn liglandajn estrarojn, senprokraste rekontakti kun siaj landaj E-societoj kaj aktivuloj kaj igi ilin sin anonci kun la nomo kaj adreso kaj, en kazo de ekzisto de grupo, kun freŝdata sciigo pri kunvendato kaj kunvenejo. Izolitaj ges-anoj, ne hezitu, sendi vian konsenton kaj adreson al la E-Centro!"

La restado de nia AEF en UEA dependas de niaj membroj. Se ili estas pretaj, pagi po membro kaj jaro S 1.50, la Federacio laŭ la statutoj de UEA estas rajtigita pri

membreco. Bv. do diskuti la problemon kaj maturigi vian opinion por la AEKongreso 1953 en Klagenfurt.

GRAVA ANONCO!

La Esperanto-eldonejo " T R A M O N D O "
Vieno 15.,Fünfhausg.16, Postsp.-Konto
171315-Wien

o f e r t a s a l v i :

"HURRA FÜR NICHTS", deutsche Ausgabe des Original-Esperanto-Romanes von Julio B a g h y , gebunden, 466 Seiten, zum Preise von . . . . . S 12.--

Anlässlich der Weihnachtsfeiertage:

bei Bestellungen bis längstens 15.12.52 die von "Tramondo" herausgegebene Esperanto-Bücherserie

"Senhalte al la Celo "(Norbert), "Tri Majstronovelo j"(Strom), "Kantaro" (AEF), "Mondopaco kiel psikologia problemo " (Thirring) , "Grundsätze des Fremdspracheunterrichtes" (AEInstituto) und die beiden Ausgaben des Steffel-Verlages "Junago" und "La kvar pagoj de la mondo" (Stieger)
zum Gesamtpreis (7 Ausgaben) von ..... S 10.--

F e r n e r auf Bestellung "Plena Vortaro" (S 78), "Leteroj de Zamenhof" (S 59) und alle Ausgaben von SAT. - Verschiedene d e u t s c h sprachliche Bücher zu billigen Preisen, sowie s ä m t l i c h e Neuausgaben auf Bestellung.

B e l e g a d o n a c o

por viaj en- kaj eksterlandaj geamikoj estas la jus eldonita A L B U M O P R I V I E N O , kies bildaro estas E-lingve eksplikita. La libro enhavas germanlingvan antauparolon de urbestro Jonas. La libro prezentas la memordonacon de la urbo Vieno al la gastoj de la urbestro ! Prezo: . . . . . S 25.-, laú la konataj kondiĉoj.

Abonu HEROLDON DE ESPERANTO por 1953!
Prezo S 50.--, pagota al "Tramondo" (vidu supre !).

LIBERECO KAJ DIGNO DE LA HOMO (Fino)

Alte konsiderinda, bedaŭrinde tro malmulte konata , trafa prologo de la eminenta aŭstria katolika poeto kaj kulturfilozofo Richard v. Kralik, siatempe dediĉita al la katolika E-istaro, "Einheitssprache"("Unueca lingvo") estis efikplene deklamata germane de f-ino Toscani, en E.(trad.A. Norbert) de Amtsrat Gasperini. La ĉiel modelan festparoladon faris juna karmelita pastro Suitbert S i e d l, denaska E-isto (filo de ges-anoj L.kaj Chr . Siedl, lastnomita E-poetino), pri "Esperanto en servo de internacia katolika agado porpaca kaj de venko kontraŭ homajn liberecon kaj dignon malrespektanta naccismo. " S-ano Ryba edife deklamis poeziaĵon "Al nia turo je Sta. Stefano" de s-ino Z i w u t s c.h k a (verkita nelonge antaŭ Ŝia elmondiĝo kvazaŭ kiel adiaŭkanto) kaj same prelegis alvoko-preĝon je beata papo Pio Xa,nun protektanto de la katolika E-movado. Per la papa himno kaj la unika "Ni volas Dion", verve luditaj de s-ino prof. Petra Göring, finiĝis la solenaĵo.

En la granda manifestacio dimanĉe, la 14.9. ni per la publika laŭtparolilo disaŭdigis, ke "la katolikaj E-istoj renkontiĝos ĉe la alirejo al IEMuzeo",tiel ankaŭ atentigante pri nia afero. Dum la tuta semajno de Katholikentag troviĝis E-angulo en Wiener Dom-Verlag (Viena Katedrala Eldonejo), ebligita per la multe dankinda komplezemo de ties direktoro s-ro Leodolt kaj supra ĉefo, prelata moŝto Fried, vizitata de diversaj interesuloj, ankaŭ eksterlandaj,i.a.de pastro nigra el Brita Afriko.

F e s t f i n o - l a b o r k o m e n c o ! Jen la lastaj vortoj en la festkunveno, ili estu plenumataj ! Estu daŭrigata kaj intensigata la laboro malgraŭ ĉiuj malhelpoj kaj malfacilaĵoj!En tiu senco flirtu nia flago:

Flirtu, kara flago, ligsimbolo,
Flirtu por la kredo kaj esper'!
Ariĝanta ĉirkaŭ vi popolo
Al vi sekvas vigle kun fier'.
Ĝi promesas jen kun firma volo
Fidelecon al la ligafer'.
Flirtu, flag' ne signo sangmilita,
Sed gvidil' en pacbatal' spirita!

Walter Mudrak.

A U S T R I A E S P E R A N T O - K R O N I K O

STIRIO: Graz: La 18. kaj 19.10. okazis la STIRIA E-TAGO. Societestro Eder en sia salutparolado,karakterizante la malfortecojn de la movado, donis novajn,impulsajn direktivojn kaj speciale bonvenigis s-anojn Hofrat Steiner kaj AEF-landestron d-ron Halbedl, kiuj siaflanke en siaj alparoloj efekte donis konstruajn konsilojn. El la programo speciale menciindas la prezentado de lumbildaroj filmo kaj sondiskoj Esperantaj, al kiuj aliĝis kiel kulmino la kolorfilmoj de s-ano Frank H a l l s ,aŭstralia gasto, kiun arego da aŭstriaj ges-anoj ekkonis kaj ekŝatis dum lia ĵusa vojaĝo tra Aústrio. La St.E. Tago ankaŭ estis honorata per la ĉeesto de s-ano M.G i v o j e el Zagreb. Por la stacidoma E-servo anoncis sin s-anoj el Graz , Kalwang, Kapfenberg, Knittelfeld, Liezen, Seebach kaj Zeltweg. - Knittelfeld: " Obersteirische Rundschau" kaj "Murtaler Zeitung" publikigis E-informojn.

SALZBURG: S-ano vikario Kaps transprenis la gvidadon de E-kurso en la popola altlernejo de Salzburg.Pro lia inciato la direktoro de la gimnazio "Borromäum" sendos petskribon al la instru-ministerio pri konsento aranĝi la fremdlingvan maturekzamenon ankaŭ en Esperanto.

VIENO: VED, la AEF-landorganizo por Vieno, aranĝis 19.10. sian kutiman E-Tagon. Ĉiroje oni rezignis pri programo organiza kaj raporta kaj kunvenigis la ges-anojn el Vieno nur por amika kuveno en restoracio "Eiserne Hand" sur Kahlenberg. Renkontiĝis 96 personoj, inter ili gastoj el Wr. Neustadt kaj Graz. Speciale gajigis ĉiujn parto - prenintojn amplekxa, humora rakonto de s-ano Hans K r a l pri la situacio de la mondo kaj Esperanto en la jaro 2000. E-grupo "HARMONIO": gastigis 24.10. s-anon Vokoun,estron de la Zagreba E-societo. Harmonio funkciigas kursojn elementan (G.Loibel) kaj porprogresintan (dir.Menacher). La E-societo "DANUBIO" la 12.10. honoris la memoronde ĝia mortinta s-anino Ziwutschka. La nobla persono revivigis en la paroloj kaj citaĵoj el ŝiaj verkaĵoj per la gesroj Feichtinger, Cech, .Gasperini, d-ro Sirk kaj Mudrak . NEKROLOGO : Forlasis niajn vicojn nia kara,fidela s-anino Josefa Klatil, 79 jara, s-ano Karl Schürrer, agema ALIE-

fukciulo en la XVIa distrikto kaj posta fervora membro de "Nia Vojo", kaj s-ano d-ro Ernst Holler, multjara entre - prenema E-isto, direktoro de realgimnazio en Baden/Vieno. Al la karaj geamikoj, foririntaj el la tera mondo,ni konservos dankan memoron. Al iliaj familianoj ni esprimas nian profundsentan kondolencon.

Merkrede, la 26.11.52,je 19.00 h

okazos en la E-Centro, Fünfhausg. 16, kunveno de Esperantistoj por preparo de E-propagando en la "KONGRESO DE LA POPOLOJ POR LA PACO", kiu havos lokon en V i e n o ekde la 12.12.52. Estas projektitaj fakkunsido de la E-istoj partoprenontaj,tradukservo,flugfolio, parolado antau la pm. 3000 delegitoj el la tuta mondo por Esperanto ktp.Ges-anoj, kunlaboru, la kongreso obligos grandstilan varbadon por nia lingvo. Anoncu vian partoprenon en la kunsido au skribe al

Iniciata Komitato por la Kongreso de laPopoloj por la Paco en Vieno.
Korespondadreso: Steffi Krautschneider, Vieno, 6., Aegidyg. 12/11.

MALSUPRA AUSTRIO: St.Pölten: La E-grupo registras la viziton de la aústralia s-ano Frank Halls, kiu entuziasmigis ĝin per siaj belegaj kolorfilmoj pri Aústralio. La grupo kore dankas al li pro la malegoisma laboro por la E-movado , kui certe fortigos la komprenon kaj amon inter la popoloj, kiuj estas tiel necesaj por daúra paco. S-ano inĝ. Withalm por la neesperantistoj tradukis lian paroladon en la germanan lingvon. S-ano A, Balague gvidis amikon Halls en la moderne instalitan infanvartejon de Voith-uzino. Wr. Neustadt: 13.10. la junularluĝisto F.Halls prezentis siajn filmojn al la loka grupo. Ĉeestis s-ro Johann Schwarz, AEF-landestro de/M.S.Aústrio.

SUPRA AÙSTRIO: Linz: Fervojista E-Fakgrupo sukcesis aranĝi 3 kursojn por oficistoj de la fervoja direkcio, ĉefriparejo kaj fervojista junularo (kune 37 partoprenamtoj). E-Societo "Estonto" preparas kursojn por laboristoj de VOESt-uzino kaj en Nettingsdorf. En la 1st-

---

citita loko la direkcio de la loka kleriga komitato petis de la liglanda AEF-estraro la okazigon de E-kurso. Linz plue komunikas jenajn kursojn: en popola altlernejo kaj fervoja direkcio (s-ano Namors) kaj perfektiga kurso en la klubejo (s-ano Sieghartner).

Ni ĝojas, povi peri la sciigon, ke s-ano N a m o r s, iĝis u r b a k o n s i l i s t o de Linz! Elkoran gratúlon al li de la tuta aústria Esperantistaro !

S-ano Heinz Matiss-Sik-Abony sendis al ni tradukon de "Erlkönig", kiu, kontraste al la iom pli detalema originalo de J.W. v. Goethe, informas la leganton pri la temo malpli temporabe. Jen ĝi:

E l f r e ĝ o

Patro kun eta infano
Rajdas tra nokt, uragano,
Elfreĝaj filinoj mute
Malbonigas infanon tute.
Patro rajdadas,
Infano kriadas,
Venas hejmen kun peno forta,
Patro vivanta - infano morta.

Por la vi bezonos ruĝajn saketojn, fade - nojn, postkartojn. Aĉetu ilin en la papervendejo, lokita en la E-Centro. - vi subtenos per tio la E-movadon ! Leterpaperojn, poŝtkartojn , skribmaterialojn , kajerojn, kolorkrajonojn, farbojn ktp. por vi kaj viaj infanoj a ĉ e t u n e p r e ĉ i a m t i e ! Venas Kristnasko :preparu mendojn !

Eigentümer und Herausgeber: Österr.Esperantistenverband.
Verlag: "Tramondo". - Verantwortlicher Redakteur : Hugo Kraus, sämtliche W i e n XV., Fünfhausgasse Nummer 16
Druck: Offset Vervielfältigung, ADRESSEN-SUPPAN Wien IV., Brucknerstrasse 2, U 41-2-70